

ESPERO KATOLIKA

REVUO MONATA

FRANÇOIS COPPÉE

SKIZO. — EKSTRAKTOJ.

François Coppée naskiĝis en Parizo (1842). Li estis ankoraŭ tre juna, kiam li ekpublikigis poemetojn. Lia unua sukceso estis: *Le Passant* (La Pasanto), unuakta komedio en versoj por du personoj, ludita en 1869 de S-inoj Agard kaj Sarah Bernhardt. Parizo admiris tiun ravan dialogon sentimentalman inter menestrel¹ kaj amantino. Post tiu sukceso venis aliaj pli valoraj komedioj (1885-1895), *Severo Torelli*, *Le Pater* (La Patro nia), *Pour la Couronne* (Por la krono), dramoj plenaj je vivo kaj poezio.

F. Coppée estis same lirika poeto, rakontisto kaj ĵurnalisto. La du precipaj karakteroj de lia genio estas emo al simpleco, kaj amo al la etuloj, al tiuj kiujn li nomas *La Humiluloj*.

La bona Suferado, kies paĝojn kelkajn ni publikigos, kun la permeso de l'glora aŭtoro, estas aro da kronikoj en prozo. F. Coppée skribis ilin por granda ĵurnalo Pariza, dum la jaro 1897. Per ili ni konas la diversajn animstatojn en kiuj sin trovis la poeto dum sia revenado al la praktikto de l'katolika religio, kiun « li estis forlasinta de sia malproksima junuleco ². »

« Mi edukiĝis kristane, li rakontas en l'antaŭparolo, kaj post mia unua komuniĝo mi plenumis miajn religiajn devojn, dum kelkaj jaroj, kun naŭva fervoreco. La krizo de la junuleco, mi franke ĝin diras, kaj la honto fari iajn konfesojn igis min forlasi miajn piajn kutimojn. Multaj homoj, kiuj same agis, rekonus, se ili estis sinceraj, ke la kaŭzo por kio ili unue forlasis la religion estis la severa regulado kiun ĝi trudis al ĉiuj pri sentoj; ke ili nur pli malfrue serĉadis en la racio kaj scienco argumentojn metafizikajn por pravigi sian agadon. Pri mi, ja, tiele fariĝis. ³ »

Tamen se F. Coppée forlasis sian religion, li neniam ĝin kontraŭbataladis « Hodiaŭ, kiam mi retrovis la kredon, mi ne pensas ke mi ĝin tute perdis. Oni povos legi en miaj skribaĵoj paĝojn malmultajn, — kiujn mi plene malaprobas kaj bedaŭras — en kiuj mi parolis pri religiaj aferoj kun malsaĝa malseriozeco, eĉ kun tre kulpa malmiteco; oni vane en ili serĉus blasfemon. ⁴ »

Li ne povis eniri preĝejon, sen ke li sentis ian kortuŝecon. La kredo, kiu dormetis en animo sia, igis lin akcepti ĉiam rezignacie la sufera-

1. Poeto muzikisto, kiu verkis kaj kantis mem siajn poemojn de kastelo kastelon, en mezaĝaj epokoj.

2. LA BONNE SOUFFRANCE. (*La bona Suferado*) de François COPPÉE, 18^e eldono Paris. Alphonse Lemerre, eldonisto. — Antaŭparolo, p. 3.

3. P. 5.

4. P. 7.

don : « De longa tempo oni kalkulas min inter ili, kiujn oni kutimas nomi : la feliĉuloj ; sed mia junuleco estis tre maldolĉa. Mi konis la malriĉecon, preskaŭ la mizeron, eĉ ne parolante pri pli malbonaj ĉagrenoj. Mi tamen neniam elĵetis krion de ribelo ¹. » Tial, kiam revenis la suferado, ĝi revekis en li la preĝon kaj kredon.

« Kvankam mi estas nur poeto, verkisto, kaj mia intelekta vivo estis preskaŭ tute plenigita de literatura laborado kaj de zorgado pri arto mia, mi estis iafoje turmentata, — kiel ĉia homo kiu volas pensadi, — de l' terura mistero pri nia ekzistado, kaj mi demandis min Kial vivo ? Kial morto ? — kaj precipe Kial suferado ? Kial larmoj ? Pri tiuj timindaj problemoj la homa spirito, oni ĝin scias, eltrovis nur necertajn kaj eĉ kontraŭajn solvojn. Nenia kontentigis min. Solvoj, kiuj forpelas la kredon en Dio kiu nin vidas kaj juĝas, kaj en nia respondecado post la nuna vivo, al mi speciale malplaĉis. Vidante tiom da maljustaĵoj, mi trovis sensenca, ke la bono kaj la malbono faritaj de homo havu konsekvencojn nur en tiu ĉi mondo. Aliparole, mi ĉiam *bezonis* Dion ! ² »

Dum unua danĝero, en j. 1897, lia konscienco laŭtigis ĝiajn postulojn, kaj la poeto diris al la Dominikana monaĥino, kiu lin flegis, ke li deziris pastron en kazo de pli minaca danĝero. Li resaniĝis kaj iom forgesis la kriojn de sia konscienco. Sed remalsano, en junio de l' sama jaro, devigis lin restadi en plena kaj dolora senmoveco dum multaj tagoj. Tiam lia spirito sin okupis pri gravaj pensadoj, kaj « tiun fojon, la pastro venis ³. » La poeto konfesis siajn pekojn « kun larmoj de l' plej sincera pentado » ; li ricevis l' absolvon kun nedirebla konsolo. Tamen li ne kuraĝis ricevi la sanktan Eŭkaristion. La pastro ne insistis kaj nur konsilis al li « Preĝu kaj legu l' Evangelion ».

Em. PELTIER.

(*Sekvo venos*).

KONGRESAJ AFEROJ

Jen kelkaj leteroj, kiujn ni recevis pri la diversaj proponoj faritaj de ni en nia Letero al S-o Michaux

Laŭfon (Svisujo), la 3^{an} de febr. 1905

Estimata sinjoro,

« Kun tre granda intereso mi legis en E. K. Nr. 14 vian leteron al S-o Michaux. Pri la Universala poŝta marko mi pensas ke ni esperantistoj povus ion fari se ni entreprenus iniciativon internacian oni devus verki petskribon sendotan al la mondpoŝtdirekcio en Berno kaj aldoni la subskribojn de ĉiuj esperantaj grupoj kaj societoj, kaj de niaj aliaj samideanoj...

« Por entrepreni grandajn iniciatojn ni devus havi internacian sekretariejon, kiu estus centra organo por ĉiuj proponoj kiel la via pri

1. P. 7-8.

2. P. 8-9.

3. P. 12.

poŝtmarko. Tiu-ĉi sekretario devus publikigi la proponojn en ĉiuj esperantaj gazetoj; niaj amikoj en la diversaj landoj ankaŭ devus havi ilian nacian centran sekretariojn, kiu publikigus la iniciatojn en naciaj ĵurnaloj kaj kolektus la esperantistajn kaj ankaŭ la neesperantistajn subskribojn en sia lando por sendi ilin poste al la internacia sekretario. Tiamaniere centralizita esperantistaro tre certe havos sukceson en siaj universalaj iniciatoj

« Tre interesanta estas por mi ankaŭ via propono pri esperanta stenografio. Kiel vi eble scias, mi verkis antaŭ unu jaro alfaron de la germana sistemo Stolce-Ŝrej al Esperanto, kies resumon mi ĵus eldonis en 3a eldono. Multaj stenografiaj kaj esperantaj gazetoj tre favore kritikis la sistemon kaj precipe en Germanujo kaj Svisujo multaj stenografistoj eklernis nian lingvon, leginte pri la esperanta stenografio. Praktike mi uzas la sistemon en korespondado kun kelkaj esperantistoj kaj en nia jara kunveno de la svisa esperanta societo mi skribis paroladojn de S-o Profesoro Cart kaj S-o D-ro. Dor (Lyon) kaj bone sukcesis. Pri tio raportis la organo de nia societo « Svisa Espero » en ĝia septembra numero kaj diris, ke estas la unuan fojon, kiam oni stenografiis esperantajn paroladojn.

Pri via propono mi nun pensas ke ĝi ne estas bone efektivebla tiamaniere, ĉar tri monatoj ne estas sufiĉe da tempo, por kreado de oficiala speciala sistemo. Oni nur povas vigligi la stenografistojn, ekzercian sistemon por nia lingvo, kaj eble post kelkaj jaroj nakiĝos la universalaj sistemo estos tiu, kiu plej bone taŭgis por stenografi esperantajn paroladojn en internaciaj kongresoj. Sistema unueco por ni hodiaŭ ne estas atingebla, sed nur post multaj praktikaj spertoj.

« Ĉu vi ankaŭ priparolus mian verketon en Via « Espero Katolika »? Estus grandega honoro por mi.

« Volonte akceptonte Viajn Sciigojn mi restas kun alta estimo.

Fr. SCHNEEBERGER, pastro.

Prezidanto de la Svisa Esperanta Societo.

Certe E. K. parolos pri via sistemo stenografia. Ni tre deziras malfermi E. K. al la tre grava demando de stenografio por Esperanto.

« Unu Sinjoro el St-O., al kiu mi parolis pri la kongreso, diris al mi ke estus dezirinda ke oni povu fari meson por Esperantistoj katolikaj ».

Ni tre ŝatas tiun belegan ideon. Alia Esperantisto diras « Meso solena postulas predikadon kaj kantadon. Predikado en Esperanto, poste publikigita France kaj Esperante, estus tre grava okazintaĵo, kiu praktike elmontrus l'utilecon de Esperanto por Pastroj, misiistoj, kaj eĉ por ĉiuj katolikaj intelektuloj en la internaciaj kongresoj.

« La himno Maria *Glor' al vi Stel' mara*, jam publikigita en E.K., tre bone taŭgas por mesa kantado. Aŭ eble via kunlaboranto kaj poeto Pastro Dombrovski, verkus novan kaj specialan versaĵon por tiu meso.»

Ni plezure ricevos aliajn proponojn de niaj legantoj.

La Kongreso en Boulogne-sur-Mer. — La Kongreso komencos la 5-an de aŭgusto. Dum la tri unuaj tagoj, oni serioze laborados. La sekvantaj tagoj, oni organizos amuzojn kaj ĉkskursojn. La karto kongresa kostos 3 fr. Estos presata libreto kun ĉiuj necesaj detaloj pri la urbo kaj pri la kongreso. Oni sendu la aliĝojn al S-o Michaux, 26, rue Wissoq, aŭ al la Direktoro de E. K.

*
* *

« Kvankam ne estante katolika, mi tre simpatias kun via revuo. Le legado de ĝi estas por mi vera plezuro. Vi scias fari enhavon interesan por ĉiuj.

« Via propono (pri stenografio) ŝajnas al mi tre bona. Tamen mi ne kredas, ke oni aprobos la konkurson por la diversaj sistemoj, kaj la sendon de manuskriptoj al speciala Komitato. Estus pli bone se en Boulogne aŭ en alia okazo anoj de diversaj sistemoj praktikus ilian stenografion. Tiuj pruvoj pli bone elmontrus la taŭgan sistemon. »

S. DE V

PRI NOMOJ PROPRAJ

Ni ricevis kelkajn leterojn pri l'artikolo tre interesa de P-o Dombrovski. Ni volonte publikigas ilin:

Kara Sinjoro,

« Mi legis kun granda intereso la artikolon de profesoro A. Dombrovski pri la propraj nomoj. Ĝi en multaj punktoj tute konsentas kun la longa studaĵo, kiun mi prezentis al la Esperantistaro en la numero aŭgusta-septembra 1898 de *L'Esperantiste* ¹.

« Mi nur altiros la atenton al unu punkto, trovata en la P. S. de la letero. La kaŭzon kial Aŭgusteno estas aŭ ŝajnas elektinda prefere ol Aŭgustino mi vidas en tio, ke tiamaniere, por tiu ĉi nomo kiel por la similaj, ni povas facile kaj regule formi la inan nomon dirante Aŭgustenino, Justenino, Valentenino. Cetere ni tie imitas en la propraj nomoj, kion faris doktoro Zamenhof en la komunaj: mateno, ĝardeno.

« Cetere, kiel mi konstatis en mia studaĵo, la demando estas tre vasta kaj ampleksas ne sole de baptonomojn sed ĉiujn aliajn geografiajn.

« Kun tre kora saluto,

Via, L. de BEAUFRONT,

Estima Kunbatalanto,

« Okaze, alitagon, mi skribis al vi pri *Jesu* aŭ *Jesuo*. Mi skribis instinkte. Hodiaŭ hazarde trafolietigante la 1896^{an} jaron de *Lingvo Internacia*, mi legas kuriozan kaj malnovan artikolon de G. Moch pri la ortografo de l'propraj nomoj. Estas nekredeble kiomajn demandojn interesajn oni trovas en la malnovaj kolektoj de niaj esperantaj

1. Aĉetebla 50 cent. ĉe la Administracio de tiu ĉi revuo, en Louviers (Eure).

ĵurnaloj ; kaj estus necese ilin legi antaŭ ol skribi pri iaj demandoj. Ekz., la artikolo de S-o Ragnar Strom en la lasta n-o de *L. I.* kiu rediras alimaniere (kaj prave) faman disputon inter S-oj Koffman kaj L. de Beaufront. *Ni turnas ĉirkaŭ la demandoj, ne solvante ian!* » — L. P.

Estimata Sinjor'direktoro,

« Min tre interesis la artikolo de P-o Dombrovski. Mi riskos kelkajn rimarkojn :

« Pri principo 2^a « *Por trovi necesajn radikojn de nomoj propraj, oni devas forĵeti la finiĝoj latinajn de l'nominativo.* » La gramatikistoj ordinare prenas la radikon el la genitivo. La vera kaŭzo, kial oni diras Esperante ALEKSANDRO, kaj ne ALEKSANDERO estas ke la genitiva radiko estas ALEKSANDR'.

« Pri principo 8^a (konservado de la duoblaj konsonantoj), se oni diras JOANNO, APOLLO, (tre prave), oni devos diri ankaŭ MATTEO, TADDEO.

« Pri principo 9^a. Ĉu vere konservinda la litero ĥ ? Ni lasu ĝin en la nomoj jam uzataj kaj konataj, kiel en MIĤAELO. Sed ĉu ni ne devus imiti nian majstron mem kiu publikigis libron titolitan : KRESTOMATIO, kaj ne ĤRESTOMATIO? Memoru ni same la vorton KEMIO nun komune uzata anstataŭ ĤEMIO; ankaŭ EŬKARISTIO, anstataŭ EŬĤARISTIO.

« Estas tre utile, ke tiaj demandoj estu priparolitaj en la revuoj. Sed la neebleco konkludi kaj trudi konkludojn, eĉ bonegajn, devigas nin deziri centran komitaton por decidi pri la dubaj kazoj. »

« Tre kore via. — Prof. E. L.

P. S. — Kiu skribos pri la Esperantigo de geografiaj nomoj? Unu el la lastaj cirkuleroj de *Akademi internasional de Lingu universal* serioze traktas la demandon. Ni ne restu malantaŭen !

► En la artikolo de Profesoro Dombrovski pri *Propraj nomoj* estas du korektindaj preseraroj (E K. n-o 14, paĝo 31-a, je la 7-a linio aŭtaŭ la fino) legu PULĤERIO, EŬĤERIO, AĤILLO, anstataŭ PULĤERIO, PULĤERO, AĤILO.

LA DORMO DE FLOROJ

La fama scienculo Henry Perlay en nova monografio skribas la floroj dormas kaj ripozas. Ĉiu observis kiel, ankaŭ dum bela vetero, ili sin fermas je specialaj horoj. Sed kial la floroj ripozas? kaj kial nur kelkaj kaj ne ĉiuj?

La lekanto sin malfermas je la levigo de l'suna, kaj sin fermas je la subiro ĝia; la « arenaria » restas malfermata de la naŭa ĝis la dekkvina; la « hieracium pilosello » sin malfermas, oni diras, je la oka kaj sin fermas je la dekkvara.

La « tragopogon pratensis » sin malfermas matene je la kvara por sin fermi ĝuste je l'tagmezo. La kamplaboristoj, en kelkaj landoj, eĉ kalkulas la tagmanĝa horoj laŭ la fermigo de tiu floro.

Kontraŭe, aliaj floroj sin malfermas dum la posttagmezaj horoj, kaj vespere.

Estas sendube do, ke ĉiuj floroj fruktigataj per la eniro de l'insektoj noktaj ne ricevus ian utilon pro ilia malfermiĝo dum la tago, dume aliparte, tiuj kiuj estas fruktigitaj per la abeloj nenion gajnos pro ilia malfermiĝo dum la nokto kaj eĉ tio ĉi estus malutilo kiu metus ilin je l'danĝero esti ŝenigitaj de ilia mielo kaj de ilia florsemo per laboro de aliaj insektoj nekapablaj ilin fruktigi.

La dormo de l'floroj kuniĝas kun la kutimoj de l'insektoj. Krom tio, kelkaj floroj kiuj altiras la insektojn per siaodoro, disigas iliajn parfumojn dum difinitaj horoj.

(El la gazeto « *Il secolo Illustrato* », 4.12.01, esperantigis IAKOBO MEAZZINI).

KOKINO

Ne malproksime de l'arbaro de Fontainebleau (Fontenblo), en pajlo-tegita dometo malriĉa kaj izolita, loĝadis Jean-Claude Dureau, mizerulo kiu provis multajn profesiojn kaj tre malfacile povis doni iom da nutraĵo al sia edzino ĉiam malsana kaj al siaj tri knabetoj el kiuj unu estas ankoraŭ infaneto.

Jen taglaboristo, jen ŝtondisbatisto sur la vojoj aŭ vendisto de luksaĵetoj sur la strato, li ĉie serĉis ion por labori; oni dungis lin por rikolti, por vinrikolti; la plej ofte li nenion faris, sekve la malriĉeco neniam forlasas lian loĝejon.

La luiganto de la dometo estis minacinta ke li elpelus la luanton, ĉar tiu-ci ne pagis la luprezon.

Tiun tagon Jean Claude mallaboris.

La telermeblo estas malplena kaj infanoj malsataj.

Malesperigita, li per pugno forte frapis sur la tablon.

— Tio ne povas daŭri pli longe, diras li al sia edzino, Annette, tio ne estas justa; mi fariĝos krimulo

Lia edzino provis kvietigi lin.

— Pripensu pri niaj infanoj, diris ŝi.

— Ĉar mi pensis pri ili, tial mi decidis ke tio tuj ĉesos; mi haviĝos monon hodiaŭ. Mi havas ja ideon ni alveturos Parizon por riĉiĝi.

— Vi timigas min, diris lia edzino; serĉu ion por fari.

Li februlo eliris; post la dometo li ekvidis malgrasegan kokinon, kiu vane serĉas grenerojn en la sablo.

Nur tiu-ĉi kokino restis al li, kiu ĝin prenis kaj reeniris dometon.

— Ni havas ankoraŭ unu kokinon, diris li, mi ne pensis pri ĝi.

— Estas la lasta aldonis Annette; ĝi estas tiel malgrasega ke mi ne kuraĝis ĝin mortigi; ĝi, kiel ankaŭ ni, tre ofte fastas.

— Mi tuj vendos ĝin.

— Neniu aĉetos ĝin, ĉar ĝi havas nur la haŭton kaj la ostojn.

— Tion ni vidos, diris Jean-Claude, kiu armiĝis per bastonego.

- Kion do vi intencas fari? demandis lia edzino maltrankviligata
- Vendi la kokinon.
- Tie restu, ĉar vi timigas min.
- Lasu min.

— Ne eliru, mi petas, diris Annette, ne fariĝu krimulo, oni arestos kaj malliberigos vin, sekve honto por ni.

— Mi devas haviĝi monon, vole ne vole, aldonis Jean-Claude, kiu foriris tenanta la kokinon per unu mano kaj per alia mano sian bastonegon. Li trafis l'arbaron kaj eniris en ĝin por atendi erarintan promenanton.

Li pensas, pri kio? li mem ne povus diri, ĉar subite frenezigiinte li sendube nescias plu kion li faras.

.

Bankiero Van Gorde venis kun multaj amikoj por viziti l'arbaron de Fontainebleau. Ĉiuj veturis tien per eleganta kaleŝo el kiu virinoj kokete vestitaj saltas, kiel ankaŭ viroj.

Provizita per fotografilo, la bankiero malsupreniĝis sur kava vojeto serĉanta belan pejzaĝon, kompreneble, por fotografi.

Li ĉiam marŝadas, kiam antaŭ li subite staras Jean-Claude kiu minacas.

La bankiero estis timigita; liaj kunuloj forestis, ĉar li volis iri iom antaŭ la cetera karavano kiun li ne povas plu aŭdi.

- Jean-Claude levis sian bastonegon.
- Kion vi deziras? demandis la bankiero
- Vendi al vi mian kokinon.

— Ĉu vi pensas ke tiu ĉi kokino utilos al mi?

— Mi nescias, diris Jean-Claude kolerema; mi havas edzinon kaj tri infanojn malsatajn; mi nelaboras; aĉetu vi mian kokinon aŭ mi mortigos vin kaj senigos vin neĝenate.

La bankiero iomete retiris sin.

— Se vi alvokos, vi tuj fariĝos malviva, rediris Jean-Claude.

— Kiom da mono vi deziras por via kokino?

— Du mil frankojn. Vi estas riĉa, ĉi-tio vidiĝas; tia sumo estas nenio por vi, sed per ĝi mi fariĝas riĉa.

La bankiero donis al Jean-Claude la postulitan prezon.

La mizerulo ĵetis la kokinon ĉe la piedojn de Van Gorde kaj forkuris. Li kuris ĝis la rando de l'arbaro; haltis, aŭskultis por koni se iu persekutas lin.

Aŭdinte nenion li trankviliĝis, venis en Fontainebleau, petis ke vinvendisto donu al li monerojn por banka bileto, aĉetis provizojn kaj revenis hejmen.

— Nun vi povas manĝi, diris li, metanta sur tablon siajn provizojn, mi vin regalas.

— Kiu do donis panon al vi? demandis lia edzino.

— Ne demandu min.

La malsataj infanoj fervore englutis la provizojn.

— Kie vi trovis monon? rediris Annette ekstremanta.

— Mi vendis la kokinon, kaj vi ne demandu min plue, sed kolektu viajn vestaĵojn ĉar tiun ĉi nokton ni foriros kaj alveturos Parizon.

(France verkita de EUGÈNE FOURNIER, el la Societo de Literaturo; esperantigita de A. DENONCIN, kun permeso de l'aŭtoro.)

(*Sekro venos*).

NOTETOJ

Propaganda Parolado. « S-oj Devoucoux kaj Rigoir faris, la 14-an de februaro, paroladon dialogitan pri Esperanto ĉe la Pariza Grupo S-a Francisko de Sales, el Unuiĝo de la Katolikaj oficistoj de l'Francaj fervojoj. Pli ol 40 oficistoj alestis la kunvenon, kiu tre sukcesis. S-o Devoucoux, speciale elmontris l'utilon de Esperanto por la dissemado de l'katolikaj ideoj tra la mondo. Li plej varme rekomendis E. K. kaj Societon E. K. al siaj samsocietanoj. Pastro Demathieux, estro de l'Grupo, kaj multaj grupanoj promesis lerni Esperanton. Oni tuj vendis lernolibrojn ».

Tio estas la vera maniero propagandi. Ni tre gratulas S-ojn Devoucoux kaj Rigoir pro ilia bonega iniciativo. Esperu ni ke aliaj katolikoj ilin imitados.

La Revue de l'Esperanto. (Bulonja), 9-an de feb., tre favore raportis pri mia letero al S-o Michaux. Enhavas ankaŭ proponojn de fremdaj Esperantistoj por la Kongreso.

Les Annales Africaines (Jan. 27-a) publikigis specimenan paĝon de *Kato kun Botoj*, kun du ilustraĵoj el la libreto al ĝi senditaj de nia eldonisto. Oni memoras, ke la teksto de *Kato kun Botoj* tre taŭgas por eklernantoj, tial ke la partoj de vortoj estas apartigitaj per signetoj.

Le Réveil Catholique (feb. 12-a) de Bordeaux, enhavas longan kaj tre bone verkitan artikolon pri Esperanto, en kiu *Semantino*, l'aŭtorino, tre afable raportas pri E. K. kaj pri nia agado. Ni esperas ke *Semantino* nun publikigos kurseton pri Esperanto, en la sama ĵurnalo: tio igos la unuan semon ankoraŭ pli fruktodonan.

Preĝaro; Imitado de Jesu-Kristo. Ni jam ricevis ian nombron da subskriboj al tiuj du libroj. La *Imitado* estos preta antaŭ la *Preĝaro*. Ni petas ke oni plej rapide subskribu, sed ne sendu monon antaŭ ol ni presigu noton pri tio en E. K.

Ŝakoj. Espereble en venonta numero de E. K. aperos ŝakaj demandoj kaj problemoj sur duonpaĝo ne de l'kovrilo, sed de la revuo mem. Niaj legantoj kredeble interesiĝos pri la *nobela* ŝaka ludo... Oni frukte legos en *Lingvo Internacia* (sept. kaj oktob. 1903) du artikolojn de S-o J. Ellis, en kiuj oni trovos plenan terminaron por ŝakludo.

► Du famaj ŝakludistoj nun batalas en Franclando: S-o Marshall probatalanto Amerika, S-o Janowski probatalanto franca. Ĝis nun Marshall gajnis 5 ludojn, Janowski nur 4. Ili faris 2 *sengajnajn* ludojn.